

Fanzeranto

Divulgando um esperanto rápido e de baixo custo

Pouso Alegre - MG - Brazilo / Brasil - Novembro / novembro - 2010 Jaro 1 / Ano 1 - Numero 03 / Número 03

Katolika rilatema retpaĝo uzas Esperanton en sia interfacio **Página de relacionamento católico usa o esperanto em sua interface**



Retpaĝo Katolika Nacio disponigas Esperanton en siaj lingvaj agordoj. Temas pri rilatema paĝo ŝablone al Orkut kaj celas la katolikan publikon. Site Nação Católica disponibiliza o esperanto em suas opções de idiomas. Trata-se de uma página de relacionamento nos moldes do Orkut e visa o público católico.

Paĝo 06 - Página 06

Esperanto kaj la revo de monda monero **O esperanto e o sonho de uma moeda mundial**



La lasta parto de la artikolo de la numismato Rafael Mattos pri la historio de la monda monero. A última parte do artigo do numismata Rafael Mattos sobre a história da moeda mundial.

Paĝo 05 - Página 05

Gelernantoj ricevis atestilojn en Silvianopolo **Alunos receberam certificados em Silvianópolis**

Paĝo 02 - Página 02

La vera ĉiutaga pano **O verdadeiro pão diário**

La bela abstrakta poezio de Anna Lobo riĉigas ĉi tiun eldonon de Fanzeranto.

A bela poezia abstrata de Anna Lobo enriquece esta edição do Fanzeranto.

Paĝo 03 - Página 03

Umbrio, lando de la sanktuloj **Úmbria, terra dos santos**



Pietro Itan prezentas sian belan regionon al la legataro de Fanzeranto.

Pietro Itan apresenta sua bela região aos leitores do Fanzeranto

Paĝo 07 - Página 07

Gelernantoj ricevis atestilojn en Silvianopolo Alunos recebem certificados em Silvianópolis

De la 13-a de Aŭgusto ĝis la 22-a de Septembro okazis en Urba Lernejo Silviano Brandão, urbo Silvianopolo - MG, unumonata kurso de Esperanto, kiu estis gvidita de la instruantino S-ino. Maria Antônia Sobral, kun la apogo de la bibliotekistino S-ino. Expedita Veloso Pereira Fernandes kaj de la sekretariino pri edukado kaj kulturo de Silvianopolo S-ino. Maria Bethânia Beraldo Gouveia. Dek unu gelernantoj ricevis atestilojn kaj ili jam sin preparas por la unujara baza kaj paroliga kurso, laŭ la metodo de la profesoro Josias Barboza, nome “Esperanto por lernejaj klasoj”.

Do dia 13 de agosto a 22 de setembro foi realizado na Escola Municipal Silviano Brandão na cidade de Silvianópolis - MG, um curso de esperanto de um mês, que foi ministrado pela instrutora Sra. Maria Antônia Sobral, com o apoio da bibliotecária Sra. Expedita Veloso Pereira Fernandes e da secretária de educação e cultura Sra. Maria Bethânia Beraldo Gouveia. Onze alunos receberam certificados e já se preparam para o curso básico e de conversação de um ano, de acordo com o método do professor universitário Josias Barboza, de nome “Esperanto por lernejaj klasoj”.

Ĉu vi volas filmojn en Esperanto?

Verda Filmejo
www.filmoj.net



Fanzerant 

Esperanta Divastigilo
Pouso Alegre - MG - Brasil
Caixa Postal 202 - CEP: 37550-000
fanzeranto.wordpress.com
fanzeranto@gmail.com

Direktoro/diretor: Fábio Roberto Silva - Diagramado/diagramação: Lumo Artes Empreendimentos -
Revizio/revisão: Maria Antônia Sobral - Silvianópolis - MG.
Fanzeranto estas sendependa organo; la opinioj de niaj kunlaborantoj ne ĉiam spegulas la niajn. Fanzeranto é um órgão independente; as opiniões de nossos colaboradores não são necessariamente as nossas.

edukado.net

Ĉu vi jam aliĝis?

ilei

www.ilei.brazilo.org

www.sudminasa.wordpress.com

Informações sobre o esperanto no Sul de Minas.
Informoj pri Esperanto en SudMinasa Regiono.





La vera ĉiutaga pano

Kiam suno leviĝas
Kaj ekklariĝas
Ja alia oportuno
estas
Por nia evoluanta
spirito
Fariĝu iom pli
libera.
El ĉeesto kun aliuloj
Kaj el ĉiaj vivspertoj
Ĉiuj ja devas profiti
Por ke vivon ni bone
regu
Kaj lasu Amon resti
En la eta mondo
De ĉiu surplanede.

Anna Lobo
Machado - MG - Brazilo
Psikologino
annapsicologia@hotmail.com

O verdadeiro pão diário

Quando o sol se levanta
E começa a clarear
De fato é uma outra
oportunidade
Para que nosso espírito
em evolução
Se torne um pouco mais
livre.
Do convívio com os
outros
E de todas as
experiências da vida
Todos de fato devem
aproveitar
Para que administremos
bem a vida
E deixemos o Amor ficar
no pequeno mundo
de cada um sobre o
planeta.

Anna Lobo
Machado - MG - Brasil
Psicóloga
annapsicologia@hotmail.com

PROCURADO



LÁZARO LUÍS ZAMENHOF

Inventor do "Esperanto"

Slogan Revolucionário: "A língua internacional que funciona."

Acredita-se ter pelo menos dois milhões de seguidores, e seu movimento subversivo está crescendo!

ARMADO com uma linguagem tão diabolicamente simples que pode ser aprendida com um livro, mas poderosa o suficiente para lidar com qualquer situação.

ATENÇÃO! Estima-se que o esperanto seja de 4 a 10 vezes mais fácil de ser aprendido do que qualquer outra língua. É muito regular, politicamente neutro e prático. O esperanto está relacionado a várias línguas, como o francês, espanhol, italiano, alemão e inglês.

PERIGO: Zamenhof está tentando espalhar a compreensão internacional. Ele é, portanto, perigoso e deve ser parado!

SE AVISTADO ou obtiver mais informações, contate o seu agente local imediatamente!

Associação de Educação e Cultura

Lázaro Luís Zamenhof

Rua da Tijuca, 51 - fundos, Centro

Pouso Alegre - MG - BRASIL

CEP: 37550-000 Caixa Postal 202

Tel: (35) 3423-0980

esperanton@gmail.com

www.asociozamenhof.50webs.com

www.sudminasa.wordpress.com

Brazila Esperanto-Ligo

Liga Brasileira de Esperanto

SDS.Edifício Venâncio III, salas 301/303

Brasília - DF - BRASIL

CEP: 70393-900 Caixa Postal 03625

Tel: (61) 226-1298 / 226-9433

226-4446

bel@esperanto.org.br

www.esperanto.org.br

Esperanto kaj la revo de monda monero O esperanto e o sonho de uma moeda mundial

En 1959 la Universala Ligo de Esperanto fiere prezentis la unuan temon pri tio, kio fariĝus la nova mona internacia sistemo, kies moneroj havis la jenajn valorojn: 1 Stelo (kupra), 5 Steloj (bronza) kaj 10 Steloj (kupronikela). Optimisme granda nombro da moneroj estis stampitaj de la entrepreno Royal Dutch Mint (Rijks munt), en Utrecht, Nederlando. Superante la probleblecojn, la disvendado de la moneroj rapide pagis la kostojn de fabrikado kaj en 1965 nova stampoprovajo de argenta monero estis estiĝis valorante 25 Stelojn.

En 1974, la Stelo estis retaksita je 0,50 da nederlanda guldeno, tiam la rilato al la prezo de la pano ĉesis. En la jaro 1977 al Stelo nova konstanto estis taksita, nome indekso de la stabilaj prezoj, bazita sur la sama sistemo uzata nuntempe por kalkuli la minimumajn salajrojn. La ideo kuŝanta sube de tiu indekso estis tiu, ke ĝi ne estus tiom influita de la inflacio same kiel okazis al eŭropaj moneroj tiuperiode.

Pro malsamaj teorioj, inter aliaj interesoj rilate la kalkulmetodon de la valoro de Stelo, komenciĝis internaj incitaj disputoj inter la estraranoj de la Universala Ligo kaj tiu disputo rezultigis la dividon de la organizacio kiu fine kasaciis la financon spertulon Sr-o Laurence Mee. De la jardeko 1980 ĝis poste, la aktivecoj de la Ligo stagnis pro la manko de novaj anoj, ĝis kiam finfine en 1993 ĝi malstariĝis kaj ĝiaj aktivoj, enkalkulante la malmultajn monerojn, estis senditaj al UEA. La revo pri komuna monera mondo cele la internacian pacon, bedaŭrinde finiĝis, neniam konkretiĝante.

En 1959 a Liga Universal de Esperanto orgulhosemamente aprezentou o primeiro tema do que viria a tornar-se o novo sistema monetário internacional, com valores de 1 Estrela (cobre), 5 Estrelas (bronze) e 10 Estrelas (cupro-níquel). As moedas foram cunhadas em grandes números com otimismo pela Royal Dutch Mint (Rijksmunt), em Utrecht, Holanda. Excedendo as expectativas, a venda das moedas rapidamente cobriu os custos de fabricação e em 1965 uma nova prova de moeda de prata foi introduzida com o valor de 25 Estrelas.

Em 1974, o Stelo foi reavaliado para 0,50 Florins Holandeses e a conexão com o preço do pão foi cortada. No ano 1977 ao "Estrela" foi fixada uma nova constante, índice de preços estáveis, baseado no mesmo sistema usado hoje para calcular os salários mínimos. A idéia subjacente a este índice era de que este não seria tão fortemente influenciado por inflação como moedas européas foram na época.


Devido a diferenças teóricas, entre outros interesses a respeito da chave para o cálculo do valor do "Estrela", surgiu uma acirrada disputa interna entre os membros da diretoria da "Liga Universal", e esta resultou na divisão da organização que acabou por cassar o perito financeiro, o Sr. Laurence Mee.

Da década de 1980 em diante, as atividades da Liga se estagnaram devido à falta de novos membros, até que finalmente em 1993 foi dissolvida e os seus ativos, incluindo as poucas moedas, foram legadas à Associação Universal de Esperanto. O sonho de um mundo com uma moeda comum para a paz internacional teve infelizmente um fim, nunca se concretizando.

Rafael Mattos - São Lourenço
Minas-Gerajso - Brazil
Numimasto
ramgu2005@hotmail.com

Rafael Mattos - São Lourenço
MG - Brasil
Numimasta
ramgu2005@hotmail.com

Universala Ligo. Kupono estigita de la unua Ligo (por interna uzado) en 1946. La ekzemplero malsupre montras la kuponon 1 Stelo. Liga Universal: Cupom introduzido pela primeira Liga (para uso interno) em 1946. O exemplar abaixo mostra o cupom 1 "Estrela".



Katolika rilatema retpaĝo uzas Esperanton en ĝia interfacio

Página de relacionamento católico usa o esperanto em sua interface



Logobildo de la retpaĝo - Logotipo do site

La retpaĝo Katolika Nacio estas rilatema retpaĝo destinita por katolikoj, tamen nuntempe kristanoj el diversaj alinomaj grupoj aktive partoprenas la retpaĝon.

Enhavante pli da 30.000 uzantoj kaj pli da 3.000 komunumoj, la retpaĝo estas tre konata en la katolika medio; la retpaĝo estas iniciato de la Asocio de Moŝto Jesuo (ASJ) kaj TV 21-a Jarcento.

Esperanto estis tre bonvena en la retejo; hodiaŭ ĝi estas la dua lingvo rilate al la kvanto da artikoloj en blogo, ĝi havas 5 komunumojn kaj la esperanta propagando ene de la paĝaro intensiĝas pli kaj pli danke la apogon de la administrantoj de Katolika Nacio.

Ekde la komenco de Julio la paĝaro disponigas sian interfacon per 4 lingvoj: portugale (natura lingvo de la retpaĝo), hispane, angle kaj esperante.

La iniciato pri esperanta propagando en la retpaĝo Katolika Nacio havas la apogon de Sendependa Asocio de Katolikaj Esperantistoj (SAKE), kies kunordigantoj estas mi, Lauro Mattesson el Sorocaba, Brazilo; Cláudio Lins el Sintra, Portugalujo kaj Enzo Liarri el Mozambiko.

O site Nação Católica é um site de relacionamento direcionado a católicos, mas atualmente cristãos de várias denominações participam ativamente do site.

Com mais de 30.000 usuários e com mais de 3.000 comunidades o site é muito conhecido no meio católico; a página é uma iniciativa da Associação do Senhor Jesus (ASJ) e da TV Século 21.

O esperanto foi muito bem recebido no site, hoje é a segunda língua com mais artigos em blog, tem 5 comunidades e a propaganda esperantista dentro do site a cada dia se torna mais intensa graças ao apoio dos administradores do Nação Católica.

Desde o começo do mês de julho está disponível no site a opção de interface em 4 idiomas: português (idioma nativo do site), espanhol, inglês e em esperanto.

A iniciativa de propaganda no site Nação Católica conta com o apoio da Associação Independente de Católicos Esperantistas (AICE) que tem como coordenadores eu Lauro Mattesson de Sorocaba, Brasil; Cláudio Lins de Sintra, Portugal e Enzo Liarri de Moçambique.

Lauro Mattesson - Sorocaba
San Paŭlo - Brazilo
Katolika Misiisto
lauromattesson@gmail.com

Lauro Mattesson - Sorocaba
SP - Brasil
Missionário Católico
lauromattesson@gmail.com

Umbrio, lando de la sanktuloj

Úmbria, terra dos santos

Umbrio estas malgranda regiono staranta en la centro de Italio, iom norde de Romo. Ĝi estas la sola regiono de la bot-forma duoninsulo (Italio) kiu ne tuŝas la maron.

La loĝantaro atingas iom malpli ol 1 milionon, do ni povas diri, ke ĝi estas samekiel unu kvartalo de San- Paŭlo.

Ĝia ĉef-urbo estas Perugia (legu: Perùĝa – latina nomo: Perusia), 160.000 loĝantoj. Ĝi estas mezepoka urbeto, sed jam etruska, nuntempe tre konata pro la universitato por fremduloj, pro la produktato de ĉokolado kaj la bombono (ĉokolajo) nomataj “peruĝina”.

Estas en Umbrio kelke da karakterizaj urbetoj mezpokaj, Orvieto, Spoleto (kie ĉiujare okazas la tiel nomata “du-monda festivalo”), Gubbio (latina Iguvium), Amelia, Spello (latine Hispellum), Norcia (Nursia), Todi (latine Tuder) kaj la pli internacie konata Assisi. En Assisi naskiĝis kaj vivis Sankta Francisko (1181-1226), eble la plej fama sanktulo de kristanismo-katolikismo kune kun sankta Petro. Umbrio estas ankaŭ nomata “tero de Sanktuloj”. Fakte, en ĉi tiu regiono, krom Sankta Francisko, naskiĝis ankaŭ aliaj “eminentaj” sanktuloj: Sankta Benedikto de Norcia (480-547 P.K.), patrono de Eŭropo kaj tiu, kiu starigis la monaĥismon; Sankta Valentino (176-273 P.K.), konata en pluraj landoj kiel sanktulo de la enamiĝintoj, naskiĝis en la umbra urbeto Terni (latine Interamna).

Ĉi tiu regiono estas ankaŭ nomata “Umbria Verde” (verda Umbrio), certe pro ĝia riĉeco je verdaĵo, pro ĝiaj bosketoj, montetoj, pro ĝiaj verdaj kaj trankvilaj pejzaĝoj.

Samekiel okazis en ĉiuj regionoj de Italio ankaŭ el Umbrio multe da homoj elmigris eksterlanden dum la komenco de 1900 jaroj, ĉefe direktitaj al Nordameriko kaj al Argentino, iom malpli al Brazilo.

Pietro Itan
Umbrio - Italio
pietroesper@libero.it

Úmbria é uma pequena região situada no centro da Itália, um pouco ao norte de Roma. É a única região da península em forma de bota (Itália) que não é banhada pelo mar.

Seus habitantes chegam a pouco menos de 1 milhão, então podemos dizer que ela é como um bairro de São Paulo.

Sua capital é Perugia, com 160.000 habitantes. Perugia é uma pequena cidade medieval, mas antes etrusca e atualmente muito conhecida pela universidade para estrangeiros, pela produção de chocolate e pelo bombom chamado “peruĝio”.

Existem na Úmbria algumas típicas cidades caracteristicamente medievais: Orvieto, Spoleto (onde todo o ano acontece o “festival dos dois mundos”), Gubbio (em latim Iguvium), Amélia, Spelo (em latim Hispellum), Norcia (Nursia), Todi (em latim Tuder) e a mais internacionalmente conhecida Assis. Em Assis nasceu e viveu São Francisco (1181-1226), provavelmente o mais famoso santo do catolicismo juntamente com São Pedro.

Úmbria é também chamada “terra dos Santos”. De fato, nessa região, além de São Francisco, nasceram outros “eminentes” santos: São Benedito de Nórícia (480-547 D.C.), patrono da Europa e quem instituiu a vida monástica; São Valentino (176-273 D.C.), conhecido em muitos países como o santo dos enamorados, nasceu na cidadezinha úmbria de Terni (em latim Interamna).

Essa região é ainda chamada de “Úmbria Verde”, certamente por sua rica vegetação, por seus pequenos bosques e montes, por suas verdes e tranquilas paisagens.

Assim como aconteceu em todas as regiões da Itália, também da Úmbria emigraram muitas pessoas no começo dos anos de 1900, principalmente para América do Norte e Argentina; e um pouco menos para o Brasil.

Pietro Itan
Úmbria - Itália
pietroesper@libero.it

Diversaĵoj - Diversos

UNU SPRITA MASTRO DE BUDO elpensis la sekvantan ruzan ŝercon.

Sur la pordo de sia budo li skribis: «Eniro senpaga». Granda amaso da publiko plenigis baldauĵo la budon. Sed kiam la gastoj volis eliri, ili renkontis du grandajn gardistojn kaj super la pordo la surskribon: «Eliro kostas kvindek centimojn». La sukceso estis brilanta. Preskaŭ ĉiuj pagis, laŭte ridante pro tiu ĉi ideo.

[M. SOLOVJEV]

LA REĜO MACEDONA Filipo respondis al siaj amikoj, kiuj diradis al li, ke la grekoj, kvankam ĉirkaŭŝutataj per liaj favoroj, tamen insultas lin: «Kio rezultus, se mi agadus kun ili pli malbone?!»

[J. SELEZNEV]

TEMISTOKLO edzinigis sian filinon je homo tre bona, sed malriĉa, «ĉar», li diris, «mia filino pli volas homon sen havaĵo, ol havaĵon sen homo».

[J. SELEZNEV]

LA ROMA ORATORO Cicero diris al unu homo, kiu diradis, ke lia edzino havas 30 jarojn: «Ĝi estas sendube vera, ĉar jam 10 jarojn mi aŭdas tion ĉi de vi».

[J. SELEZNEV]

El la verko "Anedoktoj el Fundamenta Krestomatio - L.L.Zamenhof"

UM ESPIRITUOSO DONO DE UMA BANCA teve a idéia de fazer a seguinte gozação.

Sobre a porta de sua banca ele escreveu: "Entrada franca". Uma grande quantidade de pessoas logo encheu o local. Mas quando elas queriam sair, encontravam dois grandes guardas e no alto da porta a seguinte inscrição: "A saída custa 50 centavos". O sucesso do empreendimento foi brilhante. Quase todos pagaram, dando risadas pela idéia.

[M. SOLOVJEV]

O REI Filipe da Macedônia respondeu aos seus amigos, que lhe diziam, que os gregos, embora gozando de seus favores, todavia o insultavam: "O que aconteceria se eu os tratasse pior?!"

[J. SELEZNEV]

TEMISTOKLO casou sua filha com um homem muito bom, mas pobre, "pois", ele disse, "minha filha prefere um homem sem posses, a posses sem um homem".

[J. SELEZNEV]

O ORADOR ROMANO Cícero falou a um homem, o qual lhe dizia que sua esposa tinha 30 anos: "Isso sem dúvida é verdade, pois há 10 anos ouço isso de você".

[J. SELEZNEV]

Da obra "Anedotas de Crestomatia Fundamento - L.L. Zamenhof"

Humoraĵo - Humor

Maria Antônia Sobral - Silvianópolis - MG

